



aktuala

34-a ELDONJARO

Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, informas Hélène Falk-Bracke +32 2 3584214, helene.falk @ skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metro MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

In formoj: ... <http://users.belgacom.net/EBG>; ebg.skynetblogs.be; xurb.freehostia.com; esperanto.net; le.rnu.net; uea.org; liberafolio.org; eo.eventeo.net; sites.google.com/site/ebgaktuala; sites.google.com/site/panb2001

Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Muriel Petit protokolis pri Ĝenerala Jarkunsido de EBG
 - Paĝo 4 - Guido Ricci SEL-umadis, Marija Belošević vizitis nin
 - Paĝo 5 - Eŭropa Rendevuo de Morbecque okazis
 - Paĝo 6 - Henny de Ketelaere forpasis, Jacob Hasbun noveltradukis
 - Paĝo 7 - Muriel Petit *alias* Nurja pri Post-Somera Klaĉ-Kunveno
 - Paĝo 9 - Liba Gabalda raportis pri 17a E-Semajno en Pineda de Mar
 - Paĝo 10 - Luis Vaz de Camoens, Alberto Garcia Orive, poemis
 - Paĝo 11 - Giridhar Rao asertis ke alia lingvo eblas
- Aneksa centropaĝa - Bondezirojn novjarajn, Kotiz-Tabelo 2010, Pineda

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Novembro 2009

- 4 Hélène Falk-Bracke pri "Kubo ek de jaro 1450 ĝis 1950"
- 11 Marija Belošević el Kroatujo prezentis sian eldonagadon
- 18 Hélène Falk-Bracke pri "Kubo de 1950 ĝis nun"
- 25 Bernard-Regis Larue pri Jupitero la Giganta

Decembro 2009

- 2 Preparado de Zamenhof-festo, kunlaborantoj bonvenaj
- 9 Preparado de Zamenhof-festo, kunlaborantoj bonvenaj
- 12 Sabata Zamenhof-festo de EBG jam anoncita en kutima Zeyp-centro
- 16 Seán Oriain pri "E-o Toastmasters", 50 Square Ambiorix (Eur 50), prokrastata al 2010

Januaro 2010

- 13 Eddy Raats pri vojaĝoj en Kubo
 - 20 Bernard-Regis Larue pri Saturno Majstro de la Ringoj
 - 27 Franz Meul, LVS Antverpeno pri Kuba Socio: Impreso de Vojaĝo Junia 2008
- Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

PROKOKOLO DE LA ĜENERALA JARKUNSIDO de la 14a Oktobro 2009

- **Partoprenantoj:** Estraro: Angelos Tsirimokos prezidanto; Claude GLADY kasisto kaj delegito UEA; Hélène Falk-Bracke sekretario; Georgia Henningsen vic-prezidanto; Michael Cwik informado eksteraj rilatoj; petis senkulpigon José Augusto Pinto de Sousa (malsana). Efektivaj membroj: Françoise Pellegrin instruistino; Paulo Branco eldonisto de "Aktuala"; Clara Bracke; Francine Sperber; petis senkulpigon Nelly Bracke (malsana). EBG membroj: Muriel Petit; Jan Amadori; Eric Baert; Marcel Delforge peranto de UEA; Barbara Poterucha,

- **Pri Nelly:** Nelly Bracke estas en malsanulejo "Clinique Sainte Elisabeth", 206 avenue de Fré, Uccle. Ni esperas ke ŝi rapide resaniĝos.

- **Pri mandatoj:** Georgia ricevis du mandatojn por la baloto (por voĉdoni). Estas la unua fojo ke tio okazas. Nur efektivaj membroj rajtas voĉdoni.

- **Kvorumo atingita.**

- **Aprobo de la protokolo de la ĝenerala jarkunsido 2008.**



- **Raporto de la kasisto:** Ĉi-jare, estas defikito (5253,04 €) pro escepta substeno al edukado.net (5000€). Do la "vera" defikito estas 253,04€, kio estas akceptebla. Kiel ĉiun jaron, la Zamenhof-festo havas etan defikiton. Tiu jaro, ni pagis iomete pli por "Aktuala". Sed homoj membriĝis por ricevi ĝin. Ni devas pensi kion fari kun mono kiu estas sur la konto (ne utilas lasi ĝin tiel). La nova kasisto esploras tion. Estis la kernestraro kiu decidis pri la helpo de edukado.net. Georgia petas esti informata pri tiaj gravaj decidoj. Kasisto Claude Glady demisias pro ŝanĝo de domicilio al Valonio.

- Raporto de la prezidanto:

Nombro de membroj stabilas ĉirkaŭ 100 membroj (eĉ iom kreskis). Plie, esperantistoj kiuj loĝas fore, membriĝis nur por ricevi regule "Aktuala". Transdonoj de la postenoj al pli junaj partoprenantoj: tio bonas por la estonteco de la grupo: Aktuala de Hélène Falk-Bracke al Paulo Branco. Kasisto de Claude Glady al Jan Amadori. Sekretario de Hélène Falk-Bracke al Muriel Petit. Prezidanto akceptas plu teni la postenon. Sed eble en 5 jaroj emeretiĝos, ni devos trovi novan. Niaj kursoj plu funkcias. Unua nivelo: ĉiusemajne kun Françoise Pellegrin. Ĉi-jare, 14 lernantoj partoprenas almenaŭ ĝis la 5a leciono (el kiu 3 infanoj). Estas preskaŭ tro. Donaco el la ĉielo? Aŭ ankoraŭ reklamo de Ole en "Commission en direct". Dua nivelo : du fojoj ĉiumonate kun Gregory de Ketele (8 kursanoj).

- Raporto de la sekretario:

Dum la akademia jaro "Aktuala" aperis 8-foje (ĉiumonate ekde 2009), kun litertiparo pli granda do pli facila kaj agrabla por legi. Muriel Petit ricevis premion Elfriede Ernst por partopreni IJK-n 2009 en Ĉeĥio. Koncerto de Alejandro Cossavella. Multaj prelegoj pri diversaj temoj. Vizito de Marek Blahuš. Zamenhof-festo pri Pollando. Du komunaj manĝaj festoj lernojarfinaj, unu tagmeze en Dilbeek ĉe Annie & Marc Demonty, kaj alia vespere en Brusela restoracio. Hélène Falk demisias pro aĝo sed daŭrigos informadon (hélène.falk @ skynet.be 02/358.42.14)

- Propoj por la venonta jaro :

1. Serio de prelegoj pri lando de UK: Apogite de la prezidanto, Georgia Henningsen proponas serion de prelegoj pri la lando de la UK (Kubo venontjare) por "instigi la geklubanojn engaĝi sin en kolegia-laboro". Ĉu la membroj povos proponi temojn al Paulo, Angelos, Muriel kaj Georgia? Povus esti utile havi retadresojn de ĉiuj por kontakti inter ni rapide.

2. Zamenhof-festo: Nelly estas malsana, do Françoise Pellegrin estas sola por prepari ĝin kaj bezonas helpon. Por ĉi tiu jaro "Vivu Kubo", Mario Migliucci kun teatraĵo (jam parte prezentita en Roterdamo, Bialistoko...). Françoise Pellegrin proponas ke nacia Zamenhof-festo okazu alterne en Bruselo, Valonio, Flandrio, eventuale en la germanlingvaj kantonoj, por ŝpari energion kaj kunigi ĉiujn esperantistojn el Belgio. Françoise parolos pri tio kun la aliaj kluboj kaj esploros tiun eblecon. Eble estas malfacile por kelkaj homoj iri tro malproksimen sed eblas organizi buson.

3. Delegiton de UEA: Ni devos diskuti por trovi novan. Neniu sin prezentis. José Aŭgusto Pinto de Sousa, jam FD (faka delegito) de UEA, demandota, eble transprenos la lokon de Claude Glady, kiu ne plu loĝas en Bruselo.

4. Asembleo decidas ke kotizo restas senŝanĝo (10 € normala jarmembriĝo)

5. Asembleo malŝarĝas antaŭan estraron kaj decidas pri nova prezentita estraro: Prezidanto Angelos Tsimokos; Kasisto Jan Amadori; Sekretario Muriel Petit; Georgia Henningsen; José Aŭgusto Pinto de Sousa; Michael Cwik; Paulo Branco.

6. Novaj efektivaj membroj : Jan Amadori kaj Muriel Petit.

Protokolis Muriel Petit, Bruselo la 21an de Oktobro de 2009.

SEL-UMADO

Guido Ricci-Morelli, dumviva membro de EBG, delegito de UEA en Kraainem apud Bruselo kaj Generala Sekretario de Skolta Esperanto-Ligo, organizis, tranoktadigis kaj manĝigis senpage ĉe si SEL-umadon en Bruselo. SEL-umado estas renkontiĝo de esperantistaj geskoltoj. La programo enhavis: a)vesperan viziton de Bruselo, kun kelkaj tradiciaj bierejoj kaj eblo trinki kaj manĝi; b)laboron pri la retejo de SEL; c)ekskurson en arbaro. Aliĝis: a)Fabien Tschudy, el Francio, kasisto, kaj aktivulo de Espéranto Jeunes kaj iama kandidato de EDE en la lasta Eŭropa baloto; b)Volker Schlüter, el Germanio, retisto; c)Ko Hammer el Nederlando (kun Tiny lia edzino), iama Generala Sekretario de SEL dum multaj jaroj, kaj aŭtoro de la lernolibro "Jamborea Lingvo". Jen raporto www.esperanto.org/skolta :



Ko fotis Guido, Fabien kaj Volker en SEL-umado

Okazis la unua SEL-umado apud Bruselo, Belgio, 30-10-2009 ĝis 2-11-2009. Ni vizitis urbocentron kaj kvartalon de la Eŭropa-parlamento. Ni gustumis tipajn belgajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj aŭskultis rakontojn de Ko Hammer pri la estinteco de la Skolta Esperanto-Ligo.

Sed ĉefe ni parolis pri la estonteco de la Ligo, kaj kiamaniere ni plej sukcese atingas nian celon. Nune la plej taŭga varbilo por nia ideo estas la interreto, ĉar ni povas atingi multajn homojn per ĝi. Tial ni decidis plibonigi nian interretan paĝaron. Ĝi ricevos novan aspekton kaj ni volas pliriĉigi la enhavon. Ideojn ni ordigis kaj pretigis novan strukturon. Ĉu vi volas kunlabori? Anoncu vin!

Volker Schlüter por CK de Skolta Esperanto-Ligo

KATOLIKA MESO

La venonta Meso en Esperanto en Bruselo okazos dimanĉon la 6an de decembro 2009, je la 18a horo en la Foyer Catholique Européen, rue du Cornet / Hornstraat 51, 1040 Bruselo (Etterbeek). Pastro Peter Knauer SJ prezidos la celebren. Ĉiuj samideanoj estas kore invititaj.

Guido Ricci

VIZITO DE MARIJA BELOŠEVIĆ

Marija Belošević, ĵurnalistino en Zagrebo, kaj estraranino de IKUE - Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, vizitis EBG merkrede 11-11, kaj prezentis sian tradukadon kaj eldonagadon de kroataj verkoj al Esperanto.



EŬROPA RENDEVUO DE MORBECQUE

La aranĝo ĉi-jare havis interesalvokan prelegon de Barbara Pietrzak pri Radio Varsovio kaj pup teatraĵon de Christoph Frank el Germanio. France kaj Richard Valet, el urbo 59235 Bercée, brilaj organizantoj de deko da jaroj, transpasis la torĉon al Arlette kaj Edmond Plutniak el urbo 62000 Arras. Ek de la venonta jaro, ĉiam en Novembra semajnfino, ili okazigos la aranĝon en plaĝo Stela-Marie, apud "Le Tuquet-Paris-Plage".



Gebelgoj ĉeestantaj fotiĝis kune



Staĝo nomata Eŭropa Rendevuo de Morbecque kun 70 partoprenantoj, 14-15.11.2009



Lastjara Eŭropa Rendevuo de Morbecque kun 87 partoprenantoj, 7-9.11.2008

HENNY DE KETELAERE

La 26an de aŭgusto forpasis en sia hejmo Henny De Ketelaere, 1928-2009, la plej aĝa el la granda Esperanto-familio De Ketelaere/ Jacques/ Peeters/ Tytgat/ Van Damme. Henny De Ketelaere signifis multon ne nur por sia "propra" familio, sed same multe por sia grandega Esperanto-amikaro, ne nur loke, sed vere internacie. Ŝi estis vera personigo de la amikeca spirito en nia movado.



Henny revejnis en la Internacia Festivalo de Duseldorfo je la 1a de Januaro 2009

Henny jam kiel junulino lernis Esperanton kaj ekvizitis Esperanto-aranĝojn. Sia patro Morris De Ketelaere ja estis fervora ano de la ideo de la internacia lingvo. En 1947 ŝi membriĝis en la Antverpena Esperanto-grupo kaj iĝis unu el la plej oftaj kaj regulaj vizitantoj de la klubkunvenoj. Krome ŝi ne rifuzis specialajn taskojn. En multaj diversaj estraroj ŝi havis funkcion. Henny estis estrarano pri loĝigo en la LLK por la monda Universala Kongreso en Antverpeno en 1982, kaj ŝi prizorgis la loĝigon de la renkontiĝo "Antverpen'93" kaj de la sekvaj. Dum longa tempo ŝi korektis la taskojn de la Perkoresponda Esperanto-kurso de FEL. Ankaŭ en sia privata vivo ŝi estis ĝiskora esperantistino, neniam altruda, ĉiam helpopreta. Ŝian fervoron ŝi heredigis al siaj infanoj Gerd, Lieve kaj Ilse, plu al siaj nepinoj Karlijn kaj Melinde kaj disradiis al ĉiuj aliaj membroj de sia Esperanto-familio: Ite, Kiki, Leen, Alex, Wim. La lasta deziro de Henny estis, ke ŝia korpo estu donita al la scienco. Okazis ceremonio en sabato la 5a de septembro en la preĝejo Sint-Rochus, en la distrikto Deurne de Antverpeno. Preĝejo estis plenplena.

Lau Esperanto 3000 Leuven

NOVELETO 1

Juristo Abu Hakim Ibrahim bin Dinar rakontis al mi, ke sia patro estis rakontinta jenon. Du homoj akuzitaj pri ŝtelo estis alkondukitaj ĉe halifo Ibn an-Nasaŭj. Li aperigis ilin antaŭ si kaj ordonis: "Glason da akvo!". Oni alportis ĝin al li. Li eltrinkis la akvon. Poste, li delasis la glason intence. Ĝi falis kaj rompiĝis. Unu el la du homoj konfuziĝis pro la rompiĝo, la alia eltenis sin nekonfuzeble. Li diris al la konfuziĝinto: "Vi foriru libere!", kaj al la alia: "Vi redonu kion ŝtelprenis!" Iu demandis al li: "Kiel vi sciigis pri tio?" Li respondis: "La ŝtelisto havas aplombon, kaj ne konfuziĝas. La konfuziĝinto senkulpas, ĉar se muso moviĝus en la domo, ĝi konfuziĝus lin kaj malebligis ke li ŝtelu!".

Jacob Hasbun, membro de EBG,

Esperantigis detektivajn novelojn de la abbasida periodo (7a-13a jarcento) el la araba klasika lingvo



POST-SOMERA KLAĈ-KUNVENO Muriel Petit raportas

PSKK 2009 en Zutendaal. Mi malkovris ĝin tiu jaro kaj tre ŝatis tiun esperantan agadon pro diversaj kialoj. Plue, mi pensas partopreni la venontan. Do, mi deziras kundividi kun vi tiun eksperimenton. Eble ankaŭ vi partoprenos en 2010.

PSKK estas familia renkontiĝo. Dum ĝi, mi do renkontis infanojn, junulojn kaj plenkreskulojn el diversaj landoj (ĉefe el Belgio, Germanio, Nederlando kaj Francio, sed ankaŭ el Ĉeĥio, Britio kaj Kubo). Mi tre ŝatis vidi ke esperanto viglas ĉe junuloj.

Ni estis en granda domo apud arbaro. En tiu domo, ĉambroj, manĝejo, kuirejo, ktp.

Dum PSKK, ni multe ludis, ni kelkfoje dancis, festis, ĉiam bonege manĝis (nekredeble, ĉu ne?), tranĉis kukurbojn, visitis Tongeren, aŭskultis Jomon en koncerto, babilis, rigardis movadan foiron, trejnadis kun aktivuloj, sportis, karaokis... Do ni multe ĝuis la vivon.

Por prepari nin por la venonta UK en Kubo, salsan kurson donis Bart kaj Yoa. Ankaŭ Norberto parolis pri kubaj kutimoj. Ĉu vi scias ke, en Kubo, stratoj povas esti tute malsekaj kiam ne pluvos? Por scii kiel kaj kial,

vi devos iri al UK aŭ kontakti Norberton... Mi ŝatis lerni iomete pli pri Kubo eĉ se mi partoprenos nek UKn nek IJKn.

Sabato vespere estis « halloween » festo. Kelkaj estis belegaj en kostumoj (sorĉistino, fantomo, ...). Etoso dum vespero (ne nur vespere, fakte) estis agrabla, amika, amuza...

Multe mi ludis diversajn ludojn kun partoprenantoj. Tio tre amuzis nin. PSKK estas la unua esperanta aranĝo kiun mi partoprenis, kie la manĝoj estis bonegaj (preskaŭ tro). Dankon al Nicky, Gerd kaj Yoa. Pri manĝaĵo, dankon ankaŭ al Veerle kiu kunportis ĝuplenan cidonian marmeladon.

Mi scias ke tiuj kelkaj vortoj ne sufiĉas por ke vi bone sentu kiel tiu renkontiĝo estis agrabla. Do, vi devos partopreni la venontan por vidi mem! Certe mi iros!

Pro unu litero...

Mi decidis iri al PSKK. Mi aŭdis pri tiu aŭtuna, familia renkontiĝo dum IJK en Liberec. Do mi rapide prenis informojn. Tro rapide.

Mi volis (ankaŭ) rapide atingi lokon kie okazis PSKK (Zutendaal). Do mi prenis trajnon ĝis Gent (nur 30 minutoj), eĉ se la retpaĝo de trajnoj parolis pri 90 minutoj... Eble mi volis preni la cidonian marmeladon faritan

de Veerle. Sed ne utilas ĉar ankaŭ ŝi partoprenos PSKK-n.

En Gent, mi ne trovis 45an buson. Kompreneble: tiu buso iras de Genk ĝis Maastricht. Genk kaj ne Gent... Gent ne estas Genk, do mia esperanta flago iomete tro vojaĝis. Vere ne gravas.

Tamen, en Esperantujo, ni vere scias ke unu malsama litero gravas. Vi facile trovos ekzemplojn kie unu sola litero ŝanĝas la tutan signifon. Amuze, en « Juna amiko » de septembro (sed mi nur ricevis ĝin post la PSKK) estis ludo (de Dieter Berndt el Germanio) pri tio.

Vidu la ludon

Per simpla ŝanĝo de sola litero (ĝi estas presita dike kaj kursive) vi povas veni al nova senco-hava vorto. Se vi skribos ĉi tiujn literojn sinsekve, vi ricevos tutan frazon. Provu vian vorto-krean kapablon! Atentu! Vi trovos eble vortojn el kiu estas formeblaj pluraj senco-havaj vortoj, kiel ekzemple: muro > muso, muŝo, mulo, muko, muto. Ĉi-okaze, helpos vin la senco de la frazo:

formi; hundo; kapo; kapro; kaŝi; kien; korpo; kosto; kulero; letero; libro; mano; marto; pago; papago; perdi; ponto; rando; saliko; sama; sep; suko; ventro; veŝto; vorto

Nurja



Kio estas PSKK

La landa sekcio de TEJO en Flandrio, Flandra Esperanto-Junularo (FLEJA) denove organizis Post-Someran Klaĉ-Kunvenon. En 2009 ĝi okazis en Zutendaal (en la okcidenta parto de Flandrio) de la 30a de oktobro ĝis 2a de novembro. Kadre de la renkontiĝo, okazis koncerto de JoMo en Maastricht.

<http://www.tejo.org/fr>
PSKK ekzistas ekde 1996. Celgrupo estas junularo kaj junaj familioj. PSKK-paĝo: <http://www.fleja.be/pskk/index.php>
FLEJA-fotopaĝo:

<http://users.telenet.be/esperanto/fleja/enhavo/fotoj.htm>.

Datoj

La datoj de PSKK varias de jaro al jaro, sed ili estas inter septembro kaj novembro. Komenciĝo de PSKK estas vendrede, kaj finiĝo estas en la sekva dimanĉo.

Programo

Dum PSKK oni interalie postĝuas la somerajn aranĝojn kaj antaŭĝojas la vintrajn, interŝanĝas fotojn, rakontas, prelegas. Gvidata vizito al la urbo kie okazas PSKK kaj danckurso de Bart Demeyere estas jam tradiciaj programeroj.

Ĝisnunaj PSKK-oj

PSKK	Jaro/Datoj	Urbo
14a PSKK	2009-10-30/11-02	Zutendaal
13a PSKK	2008-10-31/11-02	Zutendaal
12a PSKK	2007-10-31/11-04	Zelem (Halen)(72 el 5 landoj)
11a PSKK	2006-09-22/24	Lokeren (45 aliĝintoj el 4 landoj)
10a PSKK	2005-10-21/23	Zutendaal (57 aliĝintoj el 7 landoj)
9a PSKK	2004-10-29/11-01	Ipro(temo Halloween) (50 el 6)
8a PSKK	2003-10-31/11-04	Namuro(50 aliĝintoj)
7a PSKK	2002-09-20/22	Ronse (25 aliĝintoj)
6a PSKK	2001-09-14/16	Essen
5a PSKK	2000-11-17/19	Beverlo (NL)
4a PSKK	1999-10-22/24	Nieuwpoort-Bad
3a PSKK	1998-10-16/18	Mol
2a PSKK	1997-10-10/12	Benekom (NL)
1a PSKK	1996-10-18/20	Nijmegen (NL)

<http://eo.wikipedia.org/wiki/PSKK>

PINEDA DE MAR

Internacia E-Semajno de la Kultura kaj Turismo, 3-10 de oktobro 2009. Jam la 17-an fojon renkontiĝis la verda familio en Hispanio kaj ĝuis agrablan Esperanto-aranĝon en la ĉe-mara urbeto Pineda de Mar, kiu situas 55 km norde de Barcelono. La Semajno estis bone organizita de la triopo: Luis Serrano, Salvador Aragay kaj Santiago Torné. Ĉi-jare kolektiĝis 120 samideanoj el 13 landoj. Ni havis plezuron havi inter ni geedzan paron Norberto Diaz kaj Yoandra Rodriguez el Kubo. Ili prezentis al ni sian urbon Santi Spiritu kaj invitis la ĉeestantojn partopreni la Universalan Kongreson en Kubo venontjare en julio. Ni ĝuis belan Semajnon en la agrabla etoso de la tri-stela hotelo Stella sekvante la programon laŭ la Semajna informilo. Ĝi estis riĉa je eventoj kaj altkvalitaj prelegoj. Dum la dimanĉa inaŭguro bonvenigis nin la urbestro de Pineda s-ro Xavier Amor i Martín kaj ĉeestis aliaj du funkciuloj de urbodomo. Ni komune fotiĝis.

Stano Marček - la redaktoro de la revuo Esperanto - gvidis E-kurson laŭ sia propra instrumentado. Lia verko estas tradukita kaj eldonita jam en 23 lingvoj. Tre interesa estis prelego pri arboj de s-ro Guillem Nicolas. Li klarigis al ni kiamaniere tranĉi branĉojn de arboj por ne damaĝi ilin. Grandan sukceson havis ateliero pri produktado de poŝtkartoj kiun gvidis Wolfgang Gunter. Li asertis, ke ĉiu homo estas artisto kaj la rezultoj pravigis tion.

La premio Ada Sikorska-Fighiera estas ĉiujare aljuĝita al la plej meritplena persono en la E-agado. La unuan fojon ĝin ricevis virino - Katalin Kováts konata de ni ĉiuj kiel fervora esperantistino pri instruado kaj edukado de instruistoj. Surloke ŝi disdonis diplomojn al 2 sukcesintoj en la ekzamenoj faritaj dum la UK en Bjalistoko. Ŝi ankaŭ parolis pri la nova ekzamensistemo, prezentis filmeton rememore al forpasintoj kaj tre interese kaj detale prezentis al ni nederlandan pentriston Vincent Van Gogh. Li estas ŝia

9 pasio. Ni multon eksciis pri la vivo de tiu fama artisto.

Alia interesa prelego temis pri la natursciencaj vortoj en PIV fare de tre sperta fakulo pri pluraj sciencoj, sed ĉefe pri biologio - Claude Roux el Francio. Li okupiĝis pri reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro. Li konsilis ke estu enkondukitaj en ĝi mankantaj fakaj vortoj, malaprobis arkaismojn. Li atentigis nin pri la bona uzado de kelkaj kutimaj vortoj. Dr-ino Rafaela Urueña tre serioze parolis pri la tutmonda klimatsanĝo, pri ĝiaj konsekvencoj kaj la danĝero por la tuta homaro. Ŝi klarigis, ke la ekologia sistemo malekvilibriĝas pro tiu fenomeno kaj kaŭzas katastrofojn. Iom distra estis prezento pri Venezuelo fare de Liba (folklore vestita) kaj Floreal Gabalda. Ili prezentis serion da bildoj kaj du filmetojn. La ekspozicio de kelkaj artaĵoj, libroj, muzikiloj, kaj gustumado de gojav-dolĉaĵo kompletigis tiun plaĉan prezenton.

Dum la renkontiĝo ne mankis vesperaj programoj. En du interkonaj vesperoj ni gustumis ĉampan-vinon kaj bongustaĵojn interbabilante kun konatuloj kaj novuloj. Dum alia vespero estis prezentita la opero Nabucco. Dum debato, la temo "Ĉu la estonteco de Esperanto troviĝos en Afriko" estis multe pridiskutata. Luis Serrano ankaŭ gvidis vesperon en kiu oni rajtis esprimi siajn opiniojn pri la Semajno, doni ideojn aŭ plendi. Sed estis ĉefe pozitivaj kaj laŭdaj vortoj. La plej ŝatata programero okazas ĉiam la lastan vesperon. Ni ĝuis muzikon de la konata ensemble "Montjuic" kaj gustumis "cremat". Ĝi estas kataluna specialaĵo el spicita kaj bruligita rumo.

La tri ekskursoj konatigis nin kun aliaj partoj de Katalunio. La unua, duontaga celis la ŝtonan urbeton Peratallada. La dua, aŭto-muzeon en Sils. Impresis vastega kolekto da malnovaj aŭtomobiloj. Ĉiuj eksponaĵoj laŭdire estas funkciaj. La tuttaga ekskurso gvidis nin al la urbo Terrasa, kie ni vizitis muzeon pri Sciencoj en Katalunio. En la urbo Moia ni haltis ĉe la strato Esperanto kaj trarigardis privatan biblioteko-muzeon de Ramon Molera. Poste ni vizitis muzeon pri la historio de Katalunio. **Liba Gabalda**

10

LA LUZIDOJ DE CAMOENS

Kanto 3, 101-106, paĝo 134, Maria reĝino de Kastilujo, petas al sia patro, reĝo de Portugalujo, helpi sian edzon Alfonso XI, en milito kontraŭ la islamanoj.

101

Ĉar vidas la kastila reĝ' ke vana estus batal' frontanta tian forton, timante l' finon de l' popol' hispana (perdita foje) pli ol propran morton, li sendas al la reĝo luzitana l' edzinon karan kaj helppetan vorton; edzin' ŝi estas de l' sendant' kaj kara filin' de l' adresata reĝ' najbara.

102

Maria, la belega, do alvenis al la palac' de l' patro, brile ora; la belaj trajtoj pro malĝoj' ĉagrenis, en la okuloj estis bano plora; l' anĝelajn harojn ŝi stirnitaj tenis sur ŝultroj kaj sur kol' eburkolora; kaj al la ĝoja patro, kiu varme akceptas ŝin, ŝi jenon diras larme:

103

"En kiom da popoloj sin dividas Afriko tuta, stranga gent' barbara, tiomajn la maroka reĝo gvidas por la konker' de Hispanujo kara; potencon tian kuran ni ne vidas, de kiam teron banas salo mara. Kun tia furiozo ili iras, ke timas la vivul', mortinto miras!

104

La edzo, kiun al mi donis vi, sub la minaca maŭra spado spita disponas por defendo de l' patri' nur pri malgranda forto pormilita. Se li ne trovos helpon tie ĉi, je regno kaj je edzo senigita vi vidos min: vidvino en tristeco, sen regno, sen feliĉo kaj sen edzo.

105

Do, reĝo, antaŭ kiu timoplana kaj frosta iĝas de Muluk' torento, rapide venu kun la help' subtena al la kastila malfeliĉa gento. Se estas la akcepto ĝojmiena Konfirm' de vera patra amosento, rapidu, ĉar se vi ne tuj vin movos, neniun, eble, vi por helpi trovos."

106

Maria ŝajnis laŭ l' peteg' timida Venusa, kiam en dolor' tortura la patron petis ŝi pri helpo gvida por sia fil' Eneo, marvetura, ke falis, pro kompat', l' enmane sida fulmsago abomena kaj terura, dum la amanta patro ĉion cedis, nur bedaŭrante, ke ne pli ŝi pledis. **Leopoldo Knoedt esperantigis el la portugala**

LUDANTE KUN POSEDAJ PRONOMOJ

Plena el floraj koloroj mia brusto estas kesto; en ĝi, farita el oroj, estas por vi ama nesto.

Malgrandan neston mi havas interne la koro mia; malgrandan neston mi havas kiu estas ankaŭ via.

Al mia nesto alvenis kune kun vi, Regi mia; al mia nesto alvenis tute la animo via.

Kaj ekde tiam, Regina, la nesto antaŭe mia; kaj ekde tiam, Regina, ĝi estas mia kaj via...

...La amo flugas, Regina, ĝis la nesto mia- via; la amo flugas, Regina, ĝis la ama nesto NIA. **Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo**



Giridhar Rao (liphare dekstre) kun Probal Dasgupta, dum la Azia Kongreso de Bangaluro, foto de la redaktoro

Laŭ **Giridhar Rao**, Esperanto estas ilo por malkoloniigo. Survoje al la Nitobe-simpozio en Tokio, en la flughaveno de Hajderabado, Hindio, li renkontis amikon, kiu kun du kolegoj estis veturanta al Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso por tie instrui la anglan lingvon. Li demandis, ĉu ne temas pri lingva imperiismo, kaj unu el la instruantoj tuj konsentis: “Jes”, li diris, “nova imperiismo lingva, kaj ni povas fari nenion pri ĝi. Ni estas la soldatoj de tiu ĉi imperiismo, kaj kulpas same kiel la registaroj mem”. En sia eseo Giridhar Rao argumentas, ke por malkoloniigi la menson, nepras iri for de la tradiciaj lingvaj iloj kiuj “tiom facile nur reproduktas la neegalecojn kiujn ni volas kontraŭbatali”. Antaŭa versio de tiu ĉi eseo estis prelego farita dum la 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto, 6-8 decembro 2008, Sabadell, Katalunio, Hispanujo.

“**Homa Emancipiĝo**” estas la fina punkto en la *Manifesto de Prago*, kiu diras, ke Esperanto estas “projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homa komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili”. En granda parto de la mondo, nepra kondiĉo por la homa emancipo estas la malkoloniigo.

Mi volas argumenti, ke la fenomeno Esperanto disponebligas al ni kelkajn ilojn por la malkoloniigo. Tiujn ilojn ni rekonu, plirafinu, kaj uzu en la lukto kontraŭ hegemoniaj fortoj.

11

Kiel oni scias, la koloniismo tute ne temas nur pri la ekonomia ekspluatado. Ĝiaj psikologiaj efikoj estas tiom potencaj, ke socioj bezonas plurajn generaciojn por malkoloniigi la menson, kiel nomis la taskon la kenja verkisto Ngūgĩ wa Thiong'o. La fama eseo de Ngūgĩ de 1986 havis la titolon “Malkoloniigi la menson: la politikoj de lingvo en la afrika literaturo”. Efektive, jam en 1968 Ngūgĩ kaj liaj kolegoj en la angla fakultato de la Universitato de Kenjo verkis polemikon kontraŭ la pedagogia superrego de la angla literaturo en postkolonia afrika kunteksto. Ili pledis, ke oni metu la anglan literaturon en Afriko tien kie ĝi historie apartenas – nome en la periferion de la afrika kulturo. **Ĝuste en la kampo** de la socia membildo, kiun traktas la literaturo, troviĝas la plej grava kaj longdaŭra psika damaĝo de la koloniismo. La brita kolonia administranto en Barato, Thomas Macaulay, verkis fifaman raporton en 1835 favore al la enkonduko de la angla edukado en Barato – raporton kiu estis eksplicite malfavora al la indiĝenaj edukistemoj. Li deklaris, ke “ne estas troigo diri, ke ĉiuj historiaj informoj kolektitaj el ĉiuj libroj verkitaj en la sanskrita lingvo malpli valoras ol tio kion oni trovas en la magraj eltiraĵoj uzataj en la bazaj lernejoj de Britujo”.

En la sama raporto, li ankaŭ asertis, ke “ununura breto de bona eŭropa biblioteko valoras same kiel la tutaj indiĝenaj literaturoj de Barato kaj Arabujo”. Rezulte de tiu lia raporto, ekis en Barato 150 jaroj da supera edukado anglalingva dum kiu lernantoj, interalie, daŭre lernas multon pri la belaj someraj floroj de Britujo. Jam en la kolonia periodo, Gandhi ofte atentigis la samlandanojn pri la danĝero de tia ĉi fremdlingva kaj fremdiga edukistemo. Sed la landaj elitoj malkonsentis kun li. Gandhi deklaris, ke “*La uzo de fremda lingvo kiel la supera eduklingvo, en Barato, kaŭzis*

12

nekalkuleblan intelektan kaj moralan damaĝon al la nacio”.

Cetere, se parenteze temi pri la somero, menciindas, ke en multaj el la lingvoj de tropika Barato, estas la ombro pri kiu oni parolas pozitive; la suno mortigas. India poeto kantas pri la komfortiga ombro de la densa hararo de la amatino. Se barata junulo do sekvus la konatan ŝekspiran soneton, kaj komparus belulinon al somera tago, li invitus vangfrapon: “Ĉu mi komparu vin al tag' somera?” Vangofrapo: FATAAK!

La projekto malkoloniigi la menson devas barakti kontraŭ tiaj ĉi kulturpolitikaj bariloj. Kaj ĝuste ĉi tie rolas la rajto al gepatralingva edukado. Infanoj kiuj vizitas lernejon kie la instrulingvo ne estas la hejma lingvo suferas ŝokon. Multaj simple lasas la lernejon. Laŭ raporto de Unesko en 2008, por 80 elcentoj de la infanoj en la Filipinoj, malsamas la lerneja kaj la hejma lingvoj; la cifero por Paragvajo estas 64 elcentoj.

Simile, antaŭa raporto de 2004 de la Unuiĝintaj Nacioj sciigas, ke en sub-Sahara Afriko, el la infanoj kiuj vizitas lernejon, nur 13 elcentoj ricevas gepatralingvan edukadon. Tiuj ĉi estas skandalaj ciferoj pri la malrespekto de bazaj homaj rajtoj. La lingva subpremado estas io pri kio ni esperantistoj scias multe, aŭ proprasparte (kiel parolantoj de lingvo de malplimulto), aŭ raporte. Esperanto jam funkcias kiel deponejo de informoj pri lingva diskriminacio. Jen agadkampo en kiu ni povas kontribui al la konstruo de pli justa mondo. Por tia ĉi strategia laboro ege gravas la kunlaborado kun aliaj organizaĵoj, kaj Esperantaj kaj ne-Esperantaj.

Notindas, ĉi-kuntekste, ke pro la ŝanĝiĝanta evoluiga tagordo en postkoloniaj landoj kiel Barato, estas nuntempe multe pli facile kaj strategie utile kunlabori kun eksteraj (tio estas, ne-Esperantaj) organizaĵoj. Mi klarigu mallonge pri tio kion mi diras. Dum la

unuaj kelkaj jardekoj de sendependa Barato – ni diru, proksimume de la 50-aj jaroj ĝis la 70-aj jaroj de la 20-a jarcento – la registara strategio evoluigi la landon konsistis ĉefe el la tiel nomataj 5-jaraj ekonomiaj planoj. Tiuj planoj estis plejparte grandskalaj kaj fokusis sur la industriaj kaj agrikulturaj sektoroj: minejoj kaj ŝtalfabrikejoj; kemioplena, maŝinigita agrikulturo kaj digejoj. Efektive, nia unua ĉefministro, Nehru, nomis tiujn digejojn “temploj de moderna Barato”. Tiun periodon de la barata ekonomia evoluigo ni povas nomi la “moderna” periodo.

Sed jam de la 70-aj jaroj ekestis profunda skeptiko pri tiuj grandskalaj projektoj. Jen la “postmoderna” periodo de la evoluigaj strategioj en Barato. Oni komencis kalkuli la diversajn kostojn – homajn kaj ekologiajn – de tiu moderna evoluiga strategio. Studoj ekaperis pri la ekologia detruo kaŭzata de la minejoj, digejoj kaj la kemioplena agrikulturo. Aktivuloj ankaŭ nomis neakcepteblaj la grandajn homajn translokadojn devigajn kiujn multaj el tiuj projektoj bezonis.

Se temas pri digejoj, ekzemple, milionoj da indiĝenoj kiuj loĝadis en unuarangaj arbaroj estis devige transloĝigitaj por inundi la arbaron cele al la konstruado de la digego. Tutaj komunumoj de indiĝenoj iĝis t.n. “mediaj rifuĝintoj”, devigitaj forlasi la proprajn vivejojn. Loĝante sub aĉaj kondiĉoj en la periferio de la socia ĉeffluo, ene de unu aŭ du generacioj, ili perdis sian tutan socian kaj kulturalan kapitalon. Estis ili kiuj pagis la koston de la evoluigo de la lando.

Plue, studoj montris, ke pro diversaj historiaj kaj politikaj kialoj, kelkaj regionoj sukcesis akiri kaj kapti la avantaĝojn de tiu moderna evoluigo multe pli bone ol aliaj regionoj. Alivorte, la moderna evoluiga strategio ankaŭ pliakrigis enlandajn diferencojn – kiuj jam estis sufiĉe grandaj en tiu ĉi profunde hierarkia lando de la hindua kastsistemo.

Notindas ĉefe du rezultoj kiuj havas implicojn por Esperanto-agado en Barato. Unue, en demokratia lando kiel Barato, ekestis regionaj politikaj partioj kies reprezentantoj rapide gajnis povon, ĉar estis klare, ke Nov-Delĥio evidente malsukcesas prizorgi la lokan evoluigon. Jam de jardeko, do, ni en Barato estas en epoko de plurpartiaj koaliciaj registaroj, kun multe pli da marĉandado pri evoluigaj prioritatoj.

La dua rezulto de la registara malsukceso evoluigi la malriĉajn regionojn estas la ekfloro de neregistaraj, civilsociaj organizaĵoj. En lando kun longa historio de sociaj reformmovadoj – jam de la mezo de la 19-a jarcento – tiuj ĉi neregistaraj organizaĵoj ektrovis firmajn niĉojn de aktivado por antaŭenigi sociojustecajn celojn. La rolo de tiuj ĉi civilsociaj organizaĵoj iĝis eĉ pli grava dum tiu ĉi lastatempa fazo de la postmoderna evoluiga periodo, karakterizita de la ŝtata abdiko de siaj respondecokaj, kaj la instalo de sovaĝa tutmondiĝanta kapitalismo.

Ni notu ĉi tie, ke la abdiko de sociaj respondecokaj rilatas al la praktiko; teorie, konstitucie, Barato daŭre restas fidele al idealoj de sociaj justeco, egaleco, inkluziveco, ktp. Rezulte, la registaro trovas en tiuj ĉi neregistaraj organizaĵoj bonegan fonton de etkostaj kaj etskalaj “eksperimentoj” en socia transformiĝo. Se sukcesas tiaj ĉi eksperimentoj, ili povas trovi sin 10 jarojn poste en la registara politiko.

Pro la kresko de regionaj partioj kaj la kreskinta rolo de civilsociaj organizaĵoj, en tiu ĉi postmoderna periodo de nia evoluigo pli grandas la eblecoj, ankaŭ de la Esperanto-movado en Barato, interveni en debatoj kaj agadoj de socia transformiĝo – kaze de la Esperanto-movado en Barato, ekzemple, en iniciatoj antaŭenigi gepatralingva-bazitan multlingvan edukadon.

Ĉar la supera edukado en Barato estas en la angla lingvo, universitataj studentoj

en Barato lernas ne nur pri Barato, sed tipe ankaŭ scias multon pri la geografio, kulturo kaj politiko de Britujo kaj Usono – kaj ege malmulton pri la cetera mondo. La senkritikan akcepton de tiu ĉi kultura imperialismo ili eĉ nomas “mondcivilitaneco”. La transnacia edukado kiun proponas Esperanto – denove, ero skizita en la Manifesto de Prago – funkcias ĝuste por helpi malmunti tiun ĉi malsimetron.

Por kompreni la transnaciecan karakteron de Esperanto-edukado, sufiĉas vidi la mondeton de tradukaĵoj en Esperantujo. Kiel atentigas nin Abel Montagut (en sia prelego en Linguapax en 2004⁵), en grandskala tradukprojekto de Unesko, 70 elcentoj de la tradukaĵoj estis el unu el la kvar grandaj lingvoj de la mondo: la angla, rusa, franca kaj germana – jen la ununura breto de tiu eŭropa biblioteko pri kiu parolis Thomas Macaulay.

Sed inter 1991 kaj 2003 inter la ĉirkaŭ mil tradukaĵoj aperigitaj en Esperantujo, nur 30 elcentoj estis el tiuj kvar lingvoj. La jida, portugala, ĉina, japana kaj hungara – ĉiu el tiuj ĉi havis 5 elcentojn da tradukaĵoj. Kiel rimarkigas Montagut, “sume tiu ĉi distribuo spegulas pli fidele la lingvan realaĵon de la mondo, kaj prezentas ĝuste la inversan proporcion por la kvar grandaj lingvoj”. La prelegon de Abel Montagut oni povas legi plurlingve en la retejo Nitobe.info. Jen, do dua kampo de nia agado en la nova jarcento.

Elstara ekzemplo de tia transnacia edukado estas la esperantigo de lernolibro pri moderna historio de Ĉinujo, Koreujo kaj Japanujo, farita de skipo de esperantistoj el tiuj ĉi tri landoj. Kiel diras la aŭtoroj en la antaŭparolo de tiu rimarkinda libro, "Dum la pasintaj 4 jaroj, ni ofte spertis malsamajn opiniojn rilate al la historio, sed pere de dialogo kaj traktado, ni sukcesis havi komunan historian vidpunkton kaj nun ni eldonas la libron samtempe en la tri landoj".

Se, ekzemple, barataj, iranaj, nepalaj kaj pakistanaj esperantistoj povus kune proponi ion por antaŭenigi transnacion edukadon en la regiono, tio certe estus inda paŝo malkoloniigi la menson kaj plibonigi la ŝancojn de paco en tiu ĉi mondoparto.

Ĝuste tiu ĉi lasta propono de sudazia kunlaborado tuŝas plian flankon de la projekto de malkoloniigo. Mi klarigu per anekdoto.

En 2007, ĵus antaŭ la Universala Kongreso en Jokohamo, okazis la Nitobe-Simpozio en Tokio. La temo de la Simpozio estis eŭropaj lingvoj en Azio. Fakuloj de diversaj mondopartoj, kaj aziaj kaj neaziaj, kunvenis por dividi informojn kaj analizojn pri la kompleksaj lingvosociaj rezultoj de la kontakto inter eŭropaj kaj aziaj lingvoj. Mi varme rekomendas la aktojn de la Simpozio al ĉiuj.

Sed ne pri tiu Nitobe-Simpozio mi volas ĉi-momente paroli. Mi volas rakonti ion kio okazis al mi survoje al Tokio. En la flughaveno de mia loĝurbo Hajderabado, mi renkontis amikon kiu instruas la anglan en loka universitato – efektive, en la Universitato por la angla kaj fremdaj lingvoj. Li estis survoje al Vjetnamujo, kaj kun li estis du kolegoj, unu survoje al Kamboĝo kaj la alia iranta al Laoso.

“Pri kio temas?” mi volis scii.

“Nu”, mia amiko diris, “pro regiona interregistara interkonsento, Barato sendas instruistojn al neanglalingvaj landoj en suda Azio por instrui la anglan! Tie oni starigas registarajn centrojn por trejni instruistojn, kiuj disvastigos la anglan”.

“Do”, mi diris, “temas pri nova lingva imperiismo, ĉu ne?”

La amiko tuj malgajis, sed unu el liaj kolegoj emfaze konsentis kun mi.

“Jes”, li diris, “nova imperiismo lingva, kaj ni povas fari nenion pri ĝi. Ni estas la soldatoj de tiu ĉi imperiismo, kaj kulpas same kiel la registaroj mem”.


Nu, mia amiko jam aspektis malfeliĉa pro tiu mia rimarkigo, kaj nun ankaŭ lia kolego ekkritikis la projekton. Do, por iom malpliigi lian videblan malĝojon, mi duonŝerce kaj ironiete diris, “Nu, ni eble ne nomu ĝin lingva imperiismo, ĉu? Prefere ni nomu ĝin sud-suda kunlaborado!”

La novkoloniismo alprenas ĝuste tiajn ĉi formojn de elitaj aliancoj. La landaj elitoj jam konvinkiĝis, ke la nura lingva vojo antaŭen estas la angligo de la mondo. Almenaŭ en Barato, la kialoj estas klaraj. Fronte al malcentrismaj fortoj de regionaj partioj kiuj ekmalventas la historiajn neegalecojn inter regionoj, kaj fronte al malcentrismaj fortoj de neregistaraj iniciatoj kiuj ekdefias la historie kastbazitajn nejustecojn inter etnoj, la elitoj provas sekurigi siajn privilegiojn interalie per tiuj ĉi novaj formoj de la koloniismo.

Kiel esperantistoj, daŭre okupitaj pri aferoj lingvaj, ni povas prilumi la ideologiajn bazojn de la nunaj lingvaj potencrilatoj; ni povas plu plilabori niajn ilojn de lingva demokratio, kaj transnacia pedagogio; kaj ni povas kunlabori kun diversaj instancoj – kaj registaraj kaj neregistaraj, kaj Esperantaj kaj ne-Esperantaj – por realigi tiujn ĉi niajn jamajn komprenojn pri mondo lingve pli justa.

Tiel, ni daŭre havas validan rolon en la nova jarcento. “**Alia mondo eblas**” estas la slogano de la Monda Socia Forumo – tiu grandega koalicio de organizaĵoj lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj, kiuj kunvenas ĉiujare por batali kontraŭ la milito kaj kontraŭ la pli sovaĝaj aspektoj de la nuna tutmondiĝo. Al tiu slogano – “**Alia mondo eblas**” – ni aldonu plian, “**Alia lingvo eblas**”, por emfazi, ke en la malsimpla tasko malkoloniigi la menson, nepras iri for de la tradiciaj lingvaj iloj kiuj tiom facile nur reproduktas la neegalecojn kiujn ni volas kontraŭbatali. Kaj lingve kaj ideologie, do, Esperanto restas valora ilo por la homa emancipo.

Giridhar Rao, profesoro universitata pri lingvistiko angla, estrarano de Barata Esperanto Federacio, en Libera Folio



Membro numero unu kaj plej antikva dumviva membro, ĉiama kunlaborantino kaj valora helpantino de Esperantista Brusela Grupo



PINEDA DE MAR




17-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO



3.10 - 10.10. 2007



Fotis kai aranĝis Liba kai Floreal Gabalda



La redaktoro de
 "Aktuala Esperanto"
 deziras al Vi
 Bonajn Festojn kaj
 Feliĉan Novjaron 2010

KOTIZ-TABELO 2010

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	Abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivo de la Grupo
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	24	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	60	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)

36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	120	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1500	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara abonanto, por ke vi ne ĉesu ricevi Aktualan, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2010 al kasisto, konto 000-0 123 048-52